Mais les efforts patients des promoteurs de la langue internationale sont-ils sur le point d'aboutir ? Le mouvement est-il vraiment aussi étendu qu'on le dit ?

Nous avons tenu à en faire l'expérience.

Pour cela, nous avons choisi l'Esperanto, car c'est, de tous les projets conçus en ces dernières années, celui qui a réuni le plus grand nombre d'adeptes. Il nous a paru utile de donner aux espérantistes une occasion de se compter.

L'épreuve ne pouvait être faite par les spécialistes, car elle eût conservé son caractère d'expérience de laboratoire.

C'est une expérience publique que nous tentons.

Nous lui donnons la forme d'un concours de rébus.

Et, pour encourager les chercheurs une série de beaux prix est affectée aux vainqueurs.

Le tournoi durera six semaines (exactement six numéros de « Pages Folles ».)

Il s'agit simplement de déchiffrer le rébus donné ici et ceux qui seront publiés dans les cinq numéros consécutifs qui paraîtront après celui-ci.

Le rébus que vous avez sous les yeux constitue une phrase sentencieuse.

Un peu d'étude et une connaissance moyenne de l'Esperanto suffisent à en venir à bout.

Nous constaterons impartialement le nombre des espérantistes qui auront pris part au concours.

Nous ne saurions donc trop engager les partisans de la langue internationale à se mettre sur les rangs, dussent-ils même ne résoudre qu'un seul des problèmes proposés.

C'est en même temps qu'une distraction, une sorte de manifestation publique que nous organisons pour eux.

Nous ajouterons, pour terminer, que les problèmes ont été composés par un des plus éminents parmi les espérantistes.

N. B. — Nous prions les concurrents de n'envoyer leurs solutions qu'après l'apparition de la sixième et dernière série de ce tournoi.

Nous donnerons à ce moment le délai et le mode d'envoi des solutions.

Nos lecteurs qui ne connaissent pas l'Esperanto pourront prendre part à ce concours de rébus espérantistes en nous demandant de leur envoyer *gratuitement* une petite brochure contenant les éléments de la grammaire esperanto et un vocabulaire de 2.000 mots usuels.

Nous leur rappelons que dans les rébus espérantistes on peut prendre suivant les cas le substantif avec ou sans la terminaison *o*. Ainsi un chat se traduira indifféremment et suivant les besoins du texte par *kato* ou par *kat'*. Il arrive aussi, mais très rarement, que la terminaison *a* de l'adjectif soit supprimée. Une lettre seule est généralement suivie d'une apostrophe quand elle ne doit pas prendre son nom alphabétique. Ainsi *n* doit se lire *no*, et *n'* se lit *n*.

Les prix suivants seront décernés aux vainqueurs.

1er prix : une jolie bicyclette.
2e prix : une montre.
3e prix : un sac de voyage.
4e prix : un vide-poche.
5e prix : une pendulette.
6e prix : un service de fumeur.
7e prix : une trousse de voyage.
8e prix : un buvard de voyage.
9e prix : un joli cadre.
10e prix : une jumelle Ultra.
11e prix : un service à thé.
12e prix : un vase.
13e prix : un manucure.
14e prix : une pendulette de bureau.

Du 15e au 20e prix : une garniture de bureau.

Du 21e au 25e prix : une couverture de voyage.

Du 26e au 30e prix : un porte-brosse.

Du 31e au 35e prix : un sac à main.

Du 36e au 40e prix : un signet ouvre-lettres.

Du 41e au 45e prix : un bloc-notes de poche.

Du 46e au 50e prix : une boîte à poudre.

PASSE-TEMPS

Solvo de la Problemo N° 6

Lerta pagis al Stulta 0 fr. 25, por la tabako.

Réponse au Problème N° 7

Pour que la barrique ne pèse plus que 28 kilos, il faut la remplir de trous en quantité suffisante. (*Pardonu min !* H. C.).

Ni ricevis ĝustajn solvojn de :

S-roj A. Fabre, Desbrosses, Chassepierre, Cazeneuve, Morel, Baire, Pion, Dard kaj X... (en Amiens).

La sorto montris S-ron G. Baire, al kiu ni sendis boteleton de parfumo « Kvintesenco Gellé frères ».

Problemo N° 10

Petro kaj Karlo havas globetojn. Se vi donus al mi unu globeton, diras Petro al sia kamarado, mi havus tiom, kiom vi ; se vi donus al mi unu globeton, respondas Karlo, mi havus unu fojon pli ol vi.

Kiom da globetoj havas ĉiu knabo ?

Problème N° 10

Disposer neuf jetons sur les pointes et les intersections des lignes de l'étoile ci-dessous en observant la règle suivante :



Pour poser un jeton à un endroit quelconque de l'étoile, on devra compter, en ligne droite, 1, sur une case libre, 2, sur une case occupée ou non, et 3, sur une case libre où on le pose.

Al S-ro A. F. — Mi ne dubas, ke la problemo, kiun vi sendis al mi, multe interesis vian avon, sed precize pro tio mi bedaŭras ne povi ĝin enpresi !

Tiu el niaj legantoj montrita de la sorto inter la sendintoj de ĝusta solvo antaŭ la 15e de majo ricevos belegan portreton de D-ro Zamenhof.

HARRY COVER.

Nos Correspondants

Nos Correspondants dont on trouvera la liste ci-après, vendent au numéro « ESPERANTO » (édition française). Nous engageons vivement nos lecteurs à s'adresser également à eux pour les livres, brochures de propagande et insignes dont ils peuvent avoir besoin.

PARIS

Librairie de l'Esperanto, 15, rue Montmartre (Ier).
M. *Silvain*, 7, rue Réaumur (IIIe).
M. *Lorillard*, 50, rue des Archives (IVe).
Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède (Ve).
M. *Mocquais*, 162, rue Saint-Jacques (Ve).
Mme Monnet, 13, rue Monge (Ve).
M. *Micaud*, 38, rue Saint-Paul (VIe).
M. *Monath*, 30, rue des Saints-Pères (VIIe).
Office Central Espérantiste, 51, rue de Clichy (IXe).
Mme Pitiot, 33, rue de Trévise (IXe).
Mme Odéro, 33, avenue Trudaine (IXe).
M. *Buhler*, 239, boulev. Voltaire (XIe).
Mme Gayot, kiosque 68, 20, boulevard Saint-Denis (Xe).
M. *Beugnait*, 45, avenue de la République (XIe).
M. *Serre*, 37, boulevard Diderot (XIIe).
Mme Lacroix, 94, boulevard de l'Hôpital (XIIIe).
Mme E. Guignard, 1, rue Léopold-Robert (XIVe).
M. [illegible], 43, rue de la Pompe (XVIe).
Mme veuve Jeuninckx, 91, rue de la Chapelle (XVIIIe).
M. *Choppart*, 82, rue Ordener (XVIIIe).
M. *Séret*, 87, rue du Mont-Cenis (XVIIIe).
M. *Reguer*, 100, rue de Flandre (XIXe).

ABBEVILLE. — M. *Paul Duclercq*, libraire, 22, rue Alfred-Cendré.
ALGER. — *Comptoir Tunisien*, 2, rue Saint-Louis.
AMIENS. — *Mlle Thuillier*, bureau de tabac, place René-Goblet.
ANGERS. — M. *J. Evers*, libraire, 21, rue Voltaire.
APT. — M. *F. Pascal*, place du Palais.
ARLES. — M. *Louis Laget*, 4, rue Gambetta.
AUXERRE. — M. *Ch Gauthier*, libraire.
AVIGNON. — *Mme veuve Dailhe*, rue des Marchands.
BEAUNE. — *Esperanto Oficejo*, place de la Halle.
BEAUVAIS. — M. *Prévost*, libraire, 20, rue Saint-Pierre.
BELLEGARDE. — *Mlle Marion*, rue de la République.
BLOIS. — M. *Coutanceau*, 88, rue du Commerce.
BORDEAUX. — MM. *Ferret fils*, 15, cours de l'Intendance.
BOULOGNE-SUR-MER. — M. *Bair*, 74, rue des Pipots.
BOURG. — M. *Boyer*, 7, rue de la Caserne.
CALAIS. — M. *Baratte*, boulevard Jacquard.
CHALON-SUR-SAONE. — M. *Reinson*, 31-33, Grande-Rue.
CHARENTON. — M. *Cuzon*, 50, rue de Paris.
CHARLEVILLE. — M. *Léon Gœtz*, libraire, 3, cours d'Orléans.
CHARTRES. — M. *Louis Gauthier*, 46, rue du Soleil-d'Or.
CHATEAUDUN. — M. *Morin*, 23, rue Gambetta.
CHÂTEAURENARD. — M. *P. Isnard*, Agence générale de journaux.
CHOLET. — M. *Bennet*, 8, rue du Devau.
CORBEIL. — M. *Gauthier*, libraire, 9, rue des Remparts.
DIJON. — M. *Rey*, 26, rue de la Liberté.
DOUAI. — M. *Herclat*, 14, rue Merlin de Douai.
GRENOBLE. — M. *Gaillermain*, rue de Bonne.
LA FLÈCHE. — M. *Vérité*, libraire, rue Carnot.
LA GARENNE-COLOMBES. — M. *Longuet*, 9, rue Voltaire.
LAVAL. — *Mme veuve Goupil*, libraire.
LE HAVRE. — *Mme veuve Dombre*, 10, place de l'Hôtel-de-Ville.
LE MANS. — M. *de Saint-Denis*, libraire, rue de la Paille.
LILLE. — M. *Janny*, 59, rue Nicolas-Leblanc.
LIMOGES. — *Mlle Eorot*, 25, rue de la Mauvendière.
LOCHES. — M. *Fernandez*, libraire.
LOUHANS. — M. *Girardot-Laureau*, Grand-Rue.
LYON. — *Librairie S. Farges*, 36, rue Victor-Hugo.
MARSEILLE. — *Librairie Parisienne*, 4, rue Noailles.
MAYENNE. — M. *V. Bridoux*, place des Halles.
MONTCEAU-LES-MINES. — M. *Beaujard-Maillot*, libraire, rue Carnot.
MONTARGIS. — *Mme veuve Lecomp*, 3, rue des Lauriers.
NANCY. — M. *Berger*, 13, rue Saint-Georges.
ORANGE. — M. *A. Chastel*, 35, rue Victor-Hugo.
PONT-DE-VAUX. — M. *Gabuteau*, libraire, Grande-Rue.
RENNES. — M. *Chauvin*, 7, rue de Nemours.
ROUEN. — M. *Lainé*, 26, rue des Carmes.
SAINT-CHAMOND. — *Mlle Jeanne Ruard*, 3, rue Victor-Hugo.
SAINT-DIZIER. — M. *Gauthier*, libraire, 19, rue de l'Hôtel-de-Ville.
SAINT-ETIENNE. — M. *Trainard*, 14, rue Gambetta.
SAUMUR. — M. *Robert*, 46, rue d'Orléans.
SEMUR (Côte-d'Or). — M. *Testard*.
TOURNUS. — *Mme veuve Schenck*, libraire.
TOULON. — Mlles *Tourneur*, libraire, 6, rue de l'Intendance.
TOURS. — M. *Dugay*, 24, rue Nationale.
TROYES. — M. *Thibault-Noblat*, 99, rue Thiers.
VENDOME. — M. *Romilly*, 15, rue Potterie.
VICHY. — *Librairie Centrale*, rue de Nîmes.
VILLEMAUR-SUR-VANNE. — M. *G. Gaillard jeune*.

VIe jaro. — N° 77

Unu numero : 6 SPESDEKOJ (15 centimoj)

5 Majo 1910

ESPERANTO

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

KAJ DE INTERNACIA INSTITUTO DE ESPERANTO

Duonmonata Internacia Gazeto

Direktoro : HECTOR HODLER

ABONO

Jara Abono. . . . . 1,60 $ (4 frankoj)

La abonoj komenciĝas de la 1e de ĉiu monato. Oni akceptas nur unujarajn abonojn. Oni abonas ĉe la Administrejo, Esperanto-Oficejoj kaj lokaj Agentoj.

Redaktejo & Administrejo : *10, rue de la Bourse*, GENÈVE (Svisujo).

REKLAMO

Ĝeneralaj Agentoj : Esperanto, 10, rue de la Bourse, *Genève* (Svisujo) G. Warnier, 15, rue Montmartre, *Paris ;* C.-A.-G. Browne, 20, Wellington St., Strand, *London W.-C. ;* Germana Esp. Librejo, Rathausstr, 52, *Leipzig* Bogalke kaj Morwinkel, Schleinitzstr. 6, *Bromberg*, Berger, c/o Spineux, 3, rue du Bois-Sauvage, *Bruxelles*. — Vidu la tarifon sur la 3e paĝo.

Dum la lasta duonmonato

En sia unua kongreso, en Firenze, la ĵus fondita esp. Itala Federacio, decidis aliĝi al U. E. A. kiel Esperantia Asocio.

Ni ĵus eksciis la morton, en Bordeaux, de S-ro Paul Cazeaux, membro de la Financa kaj komeca Komisionoj de U. E. A.

Financaj Demandoj

Sufiĉe ofte okazis ke oni demandis nin, ĉu ne estus eble tuj pagi sufiĉe altan sumon, por esti membro de U. E. A. dum la tuta vivo. Ĉar la demando ŝajnis al ni interesa, ni ĝin ekstudis, kaj ĝuste en la sama tempo, ni ricevis de S-ro D-ro Stromboli, membro de la Financa Komisiono, proponon krei dumvivan kotizajon « por doni, li skribis, pli certan financan bazon al U. E. A., necesegan, precipe se ni deziras nin okopi energie pri la fako komerco ». Post diversaj interŝanĝoj de ideoj pri la demando, mi faris al la Komitato de U. E. A. jenajn proponojn : 1e la dumviva kotizajo estus 30 Sm. pageblaj en tri jaroj ; 2e la unua triono 10 Sm. estus tiuj elspezebla : la du aliaj trionoj, t. e. 20 Sm., estus spezataj al la rezerva kapitalo, tiamaniere ke, produkante interezon da 3 1/2 %, ili donus ĉiujare Sm. 0,70, t. e. proksimume la sumon de la jara kotizajo kaj de la prezo de unu jarlibro, kiu estus sendota al la dumvivaj membroj ĉiujare ; 3e ĉiujare triono de la jara kotizajo estus enskribata en la krediton de la Delegito de la regiono, kie loĝus la dumviva membro ; 4e en okazo de nepago de la tuta dumviva kotizajo, la jam spezita monsumo estus konsiderata kiel donaco ; 5e la dumviva kotizajo estus definitive havajo de U. E. A., kaj estus neniam redonota al la paginto, eĉ en okazo de eksiĝo, aŭ eksigo konforme al la Statuto de U. E. A.

∴

En la sama letero, S-ro D-ro Stromboli ankaŭ proponis krei du kategoriojn de membroj, membroj aliĝantaj kaj membroj aktivaj. Estas nedubinde vere, ke multaj personoj tute plene aprobas la idealon de U. E. A. kaj ankaŭ ĝian celon praktikan, kaj tamen povas nek ĝin aliĝi, tial ke ili ne scias Esperanton, nek doni al ni sian moralan kaj financan helpon.

Mi do ankaŭ faris al la Komitato jenan proponon : 1e Estos aprobantoj de U. E. A. ĉiuj personoj kiuj pagos jaran kotizajon da minimume 1 Sm. ; 2e Ĉiuj personoj ricevos kvitancon speciale eldonitan de la Financa Fako ; 3e la triono de iliaj kotizajoj (Sm. 0,34) estos konservata de la Delegito de ilia regiono, por la disvastigo de U. E. A. kaj plibonigo de la esperantiaj servoj en lia loko ; 4e la aprobantoj havos nek devojn, nek rajtojn politikajn aŭ aliajn, interne de U. E. A.

Tiu lasta punkto ŝajnas al mi speciale grava, ĉar la unua necesega kondiĉo por ke iu estu « civitano » de Esperantio, t. e. Esperantiano, estas ke li povu legi ĝiajn oficialajn eldonajojn en kiuj estas priskribitaj la devoj kaj rajtoj de la membroj de nia Asocio, la organizo de la servoj, kaj komentariitaj ĝiaj ideala celo kaj karaktero. Oni ankaŭ rimarku ke la fakto, ke la kotizajo de la aktivaj membroj estas pli malalta ol tiu de la aprobantoj, eble instigos kelkajn aprobantojn, ke ili lernu nian lingvon, kaj fariĝu Esperantianoj.

∴

Fine mi ankaŭ faris al la Komitato trian proponon inspiritan al mi de la sperto de la lasta jaro. Mi konstatis, ke estas neeble fari en la kongreso mem la kontroladon de la kalkuloj. Efektive ĉiuj dokumentoj, pli kaj pli multaj kaj diversaj, kiuj estas necesaj por tio, estas en la Centra Oficejo de U. E. A. Ilin kunporti al la kongreso memvideble estas ne praktika. Mi do proponas, laŭ aprobo de la Komitato, ke tiu kontrolado estu farata en la Centra Oficejo de U. E. A. La Financa Fakestro elektos por tio, post aprobo de la Komitato, du Delegitojn kaj du anstataŭantojn, verŝajne el la najbaraj urboj. La nomoj de tiuj Delegitoj estos publikigitaj en la oficiala organo de U. E. A., sufiĉe frue antaŭ la kontrolado. Se unu monaton post la publikigo, la kvinono minimume de la Delegitoj ne malaprobis, la elekto fariĝos definitiva.

∴

La lasta el tiuj tri proponoj urĝas, ĉar la afero devas esti solvita antaŭ nia Kongreso. La du unuaj ankaŭ estas urĝaj, ĉar nur ili povas alporti al nia kaso monrimedojn sufiĉajn, por ke ni povu labori sur seriozaj financaj bazoj. Oni ne forgesu ke, se U. E. A. havas la altan kaj belan taskon kunigi siajn membrojn per potencaj ligiloj de solidareco, ĝi ankaŭ havas la taskon, ja pli elspezigan, ilin kunigi per la materialoj ligiloj de internaciaj servoj, kiujn ĝi starigas por iliaj bezonoj. La sperto montris al ni ke nova servo povas esti serioze kreata kaj funkciadi nepriproĉinde, nur se ni havas en la Centra Oficejo de U. E. A. oficiston, konvene salajritan, por zorgi pri la tuta laboro ĉiam tre granda (korespondo, enslipigo, k. a.), necesegita por tiu servo.

Ni do esperas, ke niaj Delegitoj ne hezitos akcepti la tri suprediritajn proponojn, kiuj estos al ili proponataj por voĉdonado, eble post kelkaj certe tre malgravaj modifoj, en la postvenonta bulteno. Ili tiamaniere montros sian volon, ke Esperantio fariĝu ĉiam pli kaj pli potenca kaj grava, inter la diversaj internaciaj asocioj, kiuj laboras sur paca kampo, por la bono de la homaro.

Th. Rousseau,

Financa Fakestro de U. E. A.

SOCIA VIVO

KOMERCO

La komerco movado de Genova dum 1909

Movado de pasaĝeroj. Alvenis 82.933 pasaĝeroj de 3e klaso kaj 28.502 de 2e kaj 1e klaso. Forveturis 120.384 pasaĝeroj de 3e klaso kaj 19.760 de 1e kaj 2e klaso.

La plej multaj de la enmigrantoj forveturas el la haveno de Napoli.

Alvenitaj ŝipoj 6234 ; komercajoj elŝipigitaj milkilogr. 6 141.287 ; inter ili karbo milkilogr. 3.310.144 ; cerealoj milkilogr. 679.356 ; kotonoj milkilogr. 165.245.

Forveturitaj ŝipoj 6.209 ; komercajoj enŝipigitaj milkilogramoj 937.299.

A. Stromboli (Del. Genova).

AERVETURADO

Semajno de la Champagne

De la 3e ĝis la 10e de Julio, okazos en Reims grava konkurso de aviado. La kampo por flugadoj kuŝos en la nun fama ebenajo de Betheny. La aranĝoj, tribunoj, restoracioj, k. t. p. estos ankoraŭ pli konvenaj kaj pli luksaj ol tiuj de la lasta jaro. La flugvojo havos longecon da 5 kilometroj, sed laŭiros kvinangulan linion por plifaciligi la tre rapidajn flugirojn. Pli ol 100.000 $ estos disdonatoj kiel premioj ; kaj krom tio, oni konkuros por la francaj eliminaj provoj de la Gordon Bennett'a pokalo. Ĉar la Franca « Automobile club » forlasis sian projekton de aviada konkurso, do la « Semajno de Reims » (Ĉampanjo) estos la plej grava kaj plej interesa kunveno por aviado en Francujo kaj eble en Eŭropo, dum la jaro 1910. La sukcesoj de 1909 garantias la sukcesojn de 1910. Laŭ tio kion diras franca proverbo « nobela rango devigas noblan agon ». Same kiel dum la konkurso de 1909 oni trovos loĝejon kaj manĝon por malkaraj prezoj en Reims, malgraŭ la kontraŭdiraj sed falsaj informoj.

Marcel Laugner (Vic-del Reims)

IDEOJ & FAKTOJ

En Usono : Kompanioj kaj dungatoj

Ke la amerikaj industriaj mastroj sentas la bezonon por pli forta kunhelpado kun siaj dungitoj, oni povas vidi, rigardante kaj studadante la progresadon kaj disvolvadon de amerikaj aferemaj metodoj, rilate al la starigado de profitpartumado, asekuro, pensionoj, bonstatfarado, k. t. p., por la bono de la dungito. Ĉie en la industria mondo regas la sento ke pli kunigaj kaj pli bonaj interrilatoj devas establiĝi inter la dunganto kaj la dungito.

La plimulto de la grandaj fabrikkompanioj en Usono nun apartigas ĉiujare difinitan monsumon el la jargajnajo ; tiu monsumo iamaniere devas dividiĝi inter la dungitoj. Tiun ĉi dividadon oni efikas je diversaj metodoj.

Iuj kompanioj elpagas la monon kase, donante ĝin al tiuj el la dungitoj kiuj elmontris en la daŭro de la jaro, specialan kapablecon en siaj laboroj. Tia metodo por la farado de profitpartumado ne estas la plej bona kaj ne ofte troviĝas. Ĝi ne donas al ĉiuj dungitoj la samajn okazojn por partopreni en la partumado ; iuj ĝuas pli bonajn okazojn elmontri specialan kapablecon ol aliaj. Ekzemple, la ordinara laboristo en la laborejo, aŭ iu kiu laboras ĉe aŭtomata maŝino, tute ne povas elmontri eksterordinaran kapablecon, kaj tial tiuj ĉi ne povas partopreni. Kaŭze de tio ĉi kaspartumado ne estas populara.

Alia metodo, kaj kredeble la plej bona, por la dividado de la apartigita monsumo estas la vendado al la dungitoj de la akcioj de la kompanio. La dungito aĉetas la akciojn kaj pagas difinitan sumon ĉiumonate el sia salajro. Tuj kiam li abonas la akciojn li komencas ricevi la dividendojn kiuj apartenas al la akcioj. Tiuj ĉi dividendoj krediĝas en lian konton kaj uziĝas por malpliigi lian ŝuldon al la kompanio pro la aĉetitaj akcioj. Kiam li finas la pagadon, la akcio aŭ akcioj estas lia propraĵo ; li ĝin ricevas kaj la dividendojn la kompanio sendas al li poŝte ĉiutrimonate. Tiam li ne estas nura dungito sed efektiva membro de la kompanio kies interesoj kaj solidareco estas la lia ankaŭ. Se li volas, li povas vendi sian akciaron de la akciborso, sed tre malofte tio okazas pro tio ke la kompanio pagas al li ĉiun jaron dum kvin jaroj difinitan monsumon se ĝi tenos sian akciaron, tio estas, se li ne vendos ĝin. La kosto de la akcioj kiujn la dungito aĉetas ĉiam estas malpli kara ol la borsprezo. Ekzemple se la akcio vendiĝas ĉe la borso po 220 Sm., la kompanio vendas ĝin al la dungitoj po 200 Sm. Ni diru ke la dungito aĉetas unu akcion po 200 Sm. La procento estas sep ; dividende li ricevos 14 Sm. ĉiujare ; la kompanio havigos al li liberdonacon da 10 Sm. ĉiujare ; entute li ricevos ĉiujare 24 Sm. kiu egalas 12 procentan monelmeton. Oni povas kalkuli ke lia jara rento estos 120 Sm. se li aĉetus kvin akciojn. Se iufoje la dungito deziras ĉesigi sian pagadon por la abonita akcio la kompanio redonos al li lian enpagitan monon kune kun la rentumo. Ĉiam li estas protektata je sia monelmeto kaj ĉiamaniere la afero estas por lia profito. Plue por inkliniĝi lin teni sian akciaron ĝis la fino de la kvina jaro, la kompanio donas al li specialan liberdonacon. Iuj dungitoj aĉetinte akciojn perdas la fidon pri la afero, aŭ iukaŭze timiĝas, aŭ eble forlasas la laborejon, kaj tial eltiras siajn enpagitajn monojn. La kompanio tenas la 10 Sm. kiujn ĝi estus liberdonacinta al ĉiu el tiuj kiuj ĉesigis la enpagadon, se ili estus restintaj fidelaj, kaj kolektas tiujn ĉi liberdonacojn en unu grandsumon. Ĉe la fino de la kvina jaro tiu ĉi sumo dividiĝas inter tiuj kiuj restis akciantoj. Ofte tiu ĉi dividajo estas tre granda pro tio ke tiel multe da dungitoj vendas sian akciaron, aŭ tial ke ili ĉesigas la enpagadon. Tiel ĉiun jaron okazas speciala dividado de la sumo kolektigita en la daŭro de la ĵus pasintaj kvin jaroj.

Kredeble la jena mallonga tabelo pli klarigos la planon.

Johano Do, Laboristo.

Jara Salajro	1.200 Sm.
Li abonas 1 akcion po	200 »
Li pagas monate el sia salajro	20 »
Li ricevas ĉiujare dividende	14 »
Li ricevas ĉiujare liberdonace	10 »

Li ricevas ĉiukvinjare specialan liberdonacon da nesciata sumo, eble 10, 20, 50 Sm.

(Oni devas kalkuli ke la kvinjara liberdonaco okazas ĉiujare pro tio ke kvinjara tempspaco finas ĉiujare.)

Tiel ĉe la fino de malpli ol dek monatoj Johano Do posedas akcion kiu havigos al li 24 Sm. ĉiujare, kune kun nedefinita sumo, kiun akcion li povas vendi por eble 120 Sm., kaj kiu kostis al li malpli ol 100 Sm., kaj kiu akcio faras lin aktuala membro de la kompanio por kiu li laboras. Kalkulante de aĉetado da tri aŭ kvin akciojn oni vidos ke la dungito havas okazon fari tre profitdonan monelmeton.

La pli grandaj industriaj kompanioj nun starigas pensian sistemon per kiu la maljunaj dungitoj iĝas pensiuloj ĉe la aĝo 65 aŭ 70. La kiomon de la pensio havigota al la pensiulo oni determinas de la salajro ricevita dum la lastaj kvin jaroj. Kompreneble nur tiu dungito estas pensiebla kiu estas laborinta seninterrompe dum longa tempspaco, diru dudek aŭ dudek kvin jarojn. La Internacia Rikoltmaŝina Kompanio kies pensia sistemo estas la plej laŭdinda pagas al siaj pensiuloj minimume 36 Sm. ĉiumonate, maksimume 200 Sm. ĉiumonate.

Ankaŭ en la industria mondo troviĝas multaj penadoj por plibonigi la bonstaton de la dungitoj. Tiu ĉi laboro rilatas la provojn por malebligi malfeliĉajn okazojn ĉe la laborejoj, por establigi pli bonajn sanitarajn kondiĉojn, por gardi kontraŭ la malsaneco, por starigi edukigeblajojn, bonfarajojn, mallacigajojn, k. t. p.

Asekuraj asocioj starigitaj per la kompanioj pro la bono de la dungitoj, troviĝas ĉe multaj industriaj laborejoj. La asekuro gardas la laboristojn kontraŭ ĉiuj malfeliĉaj okazontajoj, la malsaneco, kaj la morto. Malgraŭ da procento de la salajroj de tiuj kiuj iĝas membroj de la asocio estas donata al la asekuraj fondoj, kaj la kompanio mem kunhelpas tre malavare. Ke tia asekuro estas tre sukcesa kaj ke ĝi estas ŝatata de la dungitoj elmontriĝas per la jenaj ciferoj eltiritaj el la raporto de la asekura asocio de la Internacia Rikoltmaŝina Kompanio. 21,600 dungitoj partoprenas ; la kompanio donacas ĉiujare 100.000 Sm., kaj dum la unuaj dekkvar monatoj de la estado de la asocio pli ol 400.000 Sm. elspeziĝis pro la profito de la membroj aŭ siaj edzinoj kaj infanoj.

Oni volus kredi ke ĉiuj tiuj ĉi laŭdindaj penadoj por la plibonigado de la vivkondiĉoj de la dungitoj estas pure filantropaj kaj homamaj, sed bedaŭrinde tute mankas iu sento alia ol la aferema sento. Estas malnova diro ke en la industria aŭ komerca afero sin trovas neniu ajn sento, kaj do la industriaj modernaj kompanioj akceptas tiun diron kiel bona. « Senanimaj korporacioj » oni nomas ilin en Usono. Efektive la vorto « donaco » ne sin trovas en la vortaro de la industriaj kompanioj. Tio kio ofte ŝajnas donaco estas anstataŭe nure bona monelmeto. Ĉiam devas esti iaj realaj rezultatoj, iaj reenspezoj pro la elspezoj. Kaj kiam tiuj kompanioj starigas profitpartumadon, pensiojn, asekuron, k. t. p. oni certiĝu ke ili atendas kompensajojn. Havi pli kontentan, pli feliĉan aron da dungitoj, havi laboristojn kiuj laboros ne nur kiel aŭtomataj maŝinoj sed kiuj elmontros koran, lojalan intereson en la aferoj de la kompanio, havi dungitaron kiu laboros ne kiel sklavoj sed kiel liberaj viroj kiuj scias ke estos rekompenco por la fidelaj, jen estas la celoj de la industriaj kompanioj de la hodiaŭa tempo kiuj tiel malavare estas elspezantaj siajn milionojn por plifeliĉigi, plikontentigi, plibonstatigi la homon kiu devas labori por gajni la vivrimedojn.

H. Hall (Cleveland).

KONGRESOJ & FESTOJ

Kongreso de Terapio Fizika en Parizo

En la granda amfiteatro de la Sorbono kun ĉeesto de la Prezidanto de la Respubliko, de la Ministro de la Instruado kaj de la reprezentantoj de la medicinaj fakultatoj francaj kaj alilandaj inaŭguriĝis la 29an de Marto la tria Internacia Kongreso de Fizika Terapio.

La prezidanto Fallières aldiris mallongan kaj elokventan paroladon esprimante al kongresistoj sian vivan deziron por la sukceso de ilia laboro. Poste li vizitis la ekspozicion de fizika terapio, hodiaŭ malfermata sub vasta provizora tegmentajo starigita antaŭ la Fakultato. Ankaŭ en la koridoroj de la lernejo troviĝas kelkaj sekcioj de la elmontro kiu aperas sukcesplena. Tie oni metis ĉiujn mineralajn akvojn de la du hemisferoj, ĉiujn elektrajn aparatojn ĝis nun elpensitaj k. t. p.

G. S.

Ĉe la Internacia Instituto de Agrikulturo

La konstanta komitato de la Internacia Instituto de Agrikulturo en la kunsido de la 15e de Marto elektis kiel prezidanton la italan delegiton markizo Cappelli.

Ĉi tiu prenante la prezidantecon eldiris paroladon en kiu antaŭ ĉio li aŭguris la akordon inter la diversnaciaj delegitoj, akordo necesa al progreso de la Instituto. Li ekzamenis poste la kritikojn faritajn al ĝia funkciado, al statistikoj kompilataj tro malfrue aŭ tro nekompletе, kaj certigis ke oni zorgas por ke la bultenoj kaj la statistikoj de la produktado de la kulturado kaj de la prezoj de la manlaboroj gajnu ĉiam pli da precizeco kaj da rapideco akirante per tio gravan valoron.

Tiamaniere ili trudos sin al komerco kaj al scienco. Same estos por la publikigajoj de la Instituto rilataj al la informoj teknikaj kaj ekonomiaj, al komerco de la grenoj, al malsanoj de la plantoj, al studoj pri kunhelpado, asekurado kaj terkultura kredito.

Nun estas necese ke la Instituto rapide kompletigu sian oficistaron dungante elementojn vere taŭgajn laŭ la vidpunktoj de la kulturo, inteligenteco, agemeco kaj disciplino.

C. S.

Sep tagoj de libertempo al ĉiuj argentinanoj

Ĉar en la proksimo Majo okazos la centjara datreveno de la argentina sendependeco, ŝtata dekreto subskribita de la Prezidanto de tiu respubliko ordonas ke la lastaj sep tagoj de Majo — komencantaj de la 25a, dato de la proklamo de sendependeco — estu festaj, ankaŭ por la biletoj komercaj kaj ekonomiaj.

Tia dekreto respondas al viva deziro esprimata de la popolo kiu deziras partopreni la solenajn patriotajn manifestaciojn.

EKSPOZICIOJ

Liberaj terspacoj publikaj ĝardenoj

Jus fondiĝis en Parizo, franca teknika asocio por liberaj terspacoj kaj publikaj ĝardenoj, kies celo estas :

1e Kunigi la personojn, kiuj sin okupas pri konstruado, zorgo kaj konservado de promenadejoj kaj publikaj ĝardenoj.

2e Krei kaj daŭrigi inter siaj membroj rilatojn konstantajn, amikajn kaj utilajn, interŝanĝadon de sciigoj kaj praktikaj ideoj pri ĉiuj profesiaj demandoj.

3e Eniri en kreotan internacian federacion de similaj societoj jam ekzistantaj en kelkaj fremdaj landoj.

Komitatano de la dirita asocio estas speciale komisiita por la korespondado kun alilandaj societoj aŭ izolitaj samprofesianoj, per Esperanto. Li akurate respondos al ĉiuj informpetoj kaj danke ricevos ĉiujn komunikajojn. Sin turni al S-ro Tiard, 29, rue du Renard, Paris IVe.

Internacia Ekspozicio de Aŭtomobiloj en Torino

De la 2e ĝis la 24e de Aprilo okazis en Torino laŭ iniciato de la Torina Automobila Klubo la sepa ekspozicio internacia de aŭtomobiloj, sub la alta protektado de la Reĝo de Italujo.

Aparte interesaj estas en ĝi la aplikoj de motoroj al industrio kaj terkulturo, kaj la sekcioj dediĉataj al aerveturado kaj al ciklismo.

Diversaj kongresoj, konkursoj kaj festoj havas lokon dum la ekspozicia tempo. La fervojoj konsentis rabatojn.

Unua Istria Ekspozicio

En la ĉarma ĉirkaŭajo urbeto Capodistrio, en la de Triesto oni malfermos de la maja ĝis septembra monato la « Unuan Histrian Ekspozicion » kiu enhavos terkulturan — industrian — maran elmeton ; didaktikan kaj antaŭzorgan elmeton ; belartajn-sciencan kaj beletristikan elmeton ; k.t.p. k.t.p. bedaŭrinde ĉi tiun unuan fojon nia kara lingvo oficiale ne partoprenos en tiu ekspozicio, tamen la subskribinto faris kelkajn klopodojn ĉe la komitatano, por plifaciligi la viziton, de tiu ekspozicio, al la eksterlanda Esperantistaro. Tial mi petas ĉiujn, kiuj intencas alvojaĝi kaj viziti la histrian ekspozicion sin turni al la Del. de Trieste.

V. Pomersa (Del. Trieste).

Ukrajnaj Ekspozicioj. — Inter la Kuriozajoj : Esperanto-Samovaro

En Ukrajnujo estos dum la somero aranĝataj du grandaj ekspozicioj : unua en Odessa, tutukrajna, dua en Katerinoslavo, samdistrikta. Ekspozicio en Odessa, la plej granda urbo en Ukrajnujo, daŭros de la 1 Junio ĝis la 15 Novembro ; sed fako vilaĝmastrumada estos malfermata nur la 1 de septembro ; krom tiu ĉi fako estos ankoraŭ du fakoj — fabrika kaj artindustria. Ĉiu fako estos dividata je kelkaj sekcioj.

Krom ĉi tio estos aranĝataj specialaj ĉambroj, en kiuj estos montrataj novelpensitaj iloj, instrumentoj, maŝinoj, k. t. p.

Sed la plej rimarkinda vidindajo estos la grandegulo-samovaro (temaŝino), elpensita kaj konstruita de nia kara kunlaboranto S-ro E. Fon-Fjuler ; alte ĝi estos 22 metroj ; kaj tiu-ĉi samovaro estos tute esperanto ; ĉiuj surskribajoj de ĝi estos skribitaj nur en Esperanto, kaj interne de ĝi estos vendataj ĉiuj esperantajoj. Supre de ĝi estos konstruita plateto, sur kiu per pingloj estos vidataj ĉiuj lokoj de terglobo, en kiuj ekzistas esperantistaj societoj, grupoj, delegitoj de U. E. A., k. t. p. ; sur la muroj de plateto estos pendataj ĉiuj esperantaj gazetoj, libroj, broŝuroj, katalogoj, poŝtkartoj kaj aliaj esperantajoj ; antaŭ globuso staros malgranda tablo kun bela libro, en kiun ĉiuj trapasontaj esperantistoj estas petataj enskribi sian nomon kaj adreson ; post la globuso sur la muro estos pendata granda portreto de nia kara Majstro D-ro L. Zamenhof, ornamota per belaj esperantistaj flagoj kaj rubandoj. Tiamaniere tiu grandegulo-samovaro estos tute esperanta. Krom tio en ĝenerala paviliono tiel same estos ekspoziciotaj sur la spaco de 15 kvadrataj metroj ĉiuj esperantajoj. Sekve nia kara ideo estos tre bone propagandata en Odesso. Kaj de post unua rusregna kongreso esperantista en Peterburgo kaj granda ekspozicio en Odesso esperanta movado tre multe gajnos en Ukrajnujo, la dua laŭ kvanto de loĝantoj el ĉiuj slavaj landoj.

La dua ekspozicio de Ukrajnujo estas aranĝota en urbo Katerinoslavo apud rivero Dnipro : ĝi estas priskribota post mallonga tempo.

V. Fomenko (Del. Odessa).

Homara Dataro

1 *Majo*. — Tutmonda festo de la laboristoj. — 1855. Malfermo de la universala ekspozicio en Parizo. — 1874. Mortas en Firenzo Nikolo Tomaseo el Sebeniko (Dalmacjo), literaturisto kaj klerulo.

2. 1616. Mortas angla poeto Shakespeare. — 1668. Unua paco de Aaken (Akvisgrano) per kiu finiĝas la milito dirita de Devolucio. — 1844. Morta sveda poeto Josefo Dahlgren.

3. 1469. Naskiĝo de Nikolo Macchiavelli. — 1873. — Mortas la fama geografia esploristo Livingstone. — (3-4) 1811. Venko de Wellington sur *Massena* ĉe Almeida (Portugalujo).

4. 1848. Franca kunsido de la reprezentantoj proklamas la respublikon.

5. 570. Naskiĝas Mahometo. — 1800. Garibaldi kun 1000 volontuloj levas la ankrojn de la rifo Quarto por la ekspedo de Sicilio. — 1902. Fajra pluvo de la vulkano Pelée detruas la urbon Saint-Pierre en la Martiniko ; 30.000 mortintoj.

Servoj de Junula Fako

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(U. E. A.)

OFICIALA INFORMILO

La Faktoj

Regularo de la Kongresoj

FELIETONO DE « ESPERANTO »

LA KATO

de D-ro JOHANO RAJBERTI

ĝoj estos prizorgataj de komisiono elektota de la Administra fako inter la Esperantianoj de la regiono, kie okazos la Kongreso.

§ 21. — La elspezoj por la publikigado de la kongresaj kaj aranĝoj estas repagataj per la kongreskotizajoj kaj la donacoj. Por ĉiu kongreso povos esti eldonataj helpkongresaj kartoj por la personoj, kiuj ne ĉeestis en la kongreso, sed deziras ricevi ĝiajn dokumentojn.

§ 22. — En okazo de profito el la kongresaj spezoj almenaŭ duono estos difinata por speciala kongresfondajo

Aprobita de la Komitato de U. E. A.

La Prezidanto de U. E. A.

H. BOLINGBROKE MUDIE.

Por la Administra Fako,

H. HODLER, komitatano.

ESPERANTIA VIVO

Paul Cazeaux

Kun profunda ĉagreno ni eksciis la morton de nia sindona Esperantia helpanto, Sinjoro Paul Cazeaux, konsulo por maraferoj en Bordeaux kaj membro de la komerca kaj turisma komisionoj de U. E. A. Lia morto estas grava perdo por nia Asocio, pri kiu li laboradis jam de la plej frua tempo. En tiu momento kiam al ni tute mankis la helpantoj, li mem sin proponis por kunlabori. La turismaj kaj komercaj aplikoj de U. E. A. lin speciale interesis kaj li en tiuj fakoj faris tre gravajn kaj ŝatitajn servojn al nia Asocio. Li fariĝis estro de la subfako gvidfolioj; li mem faris la planon de tiuj gvidfolioj kaj havis la fruktodonan ideon ilin eldoni laŭ la sama formato. Kun obstina energio li klopodis por eldonigado de tiuj gvidfolioj kaj havis pri tio grandan korespondadon, kiun li plenumis kun imitinda ordemeco kaj akurateco.

Li poste ankaŭ sin okupis pri komercaj demandoj interne de U. E. A.; li prezentis al nia komitato projekton pri komercaj reprezentantoj kaj bonegan regularon pri informpetoj, laŭ kiu estis ellaborita la definitiva regularo. Li certe estus ankoraŭ multege helpinta al la disvolvo de nia Asocio per siaj ĉiam praktikaj kaj saĝaj iniciatoj, el kiuj la entrepreno de la gvidfolioj sufiĉas por rememorigi pri lia nomo.

Li ne nur laboris, sed ankaŭ iafoje faris diskretajn malavarajn mondonacojn al U. E. A. En ĝi li vidis fonton de sennombraj praktikaj fruktoportaj aplikajoj kaj la triumfon de Esperantismo li juĝis ebla nur per U. E. A. Li estis modestulo, sed modestulo, kiu plenumis sian utilan taskon kaj pli helpis al ni ol dekoj da varmaj aprobantoj, ĉar lin ne timigis la materiala laboro, sen kiu nenio serioza estas starigebla. Ĉiuj Esperantianoj danke konservos en si la memoron pri lia nomo.

Al lia vidvino kaj al lia familio ni prezentas la certigon de nia respektplena simpatio.

H. H.

Esperantiaj Informoj

Augsburg (Bavarujo). — Okaze de la vizito de S-ro Hodler, viceprez. de U. E. A., sukcesa festo estis aranĝita en hotelo 3-Mohren. Ĉeestis cento da Esp.-istoj. S-ro Beideck anoncis, ke la tuta grupo (cirkaŭ 150 membroj) aliĝis kiel Esp.-ia Asocio. S-ro Hodler poste paroladis pri la signifo de U. E. A. kaj la rolo de la venonta kongreso. Sekvis ĝoja balo kaj ĥora kantado de l'Espero. Ĉio antaŭsignas gajajn belajn kongrestagojn.

[...]

Esp.-Asocio, nia afero havis tie grandajn sukcesojn. Oni prave povas diri, ke alilandano povas jam nun agrable iri en Godesberg nur per Esp., ĉar la Esp. organizo estas perfekta (konsuloj, oficejo, gastotabloj, ktp) kaj ekzistas bonaj pensionhoteloj kaj magazenoj, kie oni parolas Esp. Lastan someron, venis Esp.-istoj germanaj, anglaj, francaj, belgaj, holandaj, danaj, rusaj. Baldaŭ aperos Esp. gvidlibreto. Por ĉiuj informoj sin turni al la Del., S-ro Th. Oster.

Mosko (Rusujo). — En « La Ondo de Esperanto » nia fervora Del., S-ro Szabunlewicz, aperigis bonegan artikolon pri U. E. A. La nombro de la Esp.-istoj daŭras ĝojige kreski.

Esperanto-Tago en London

La komitato elektita por aranĝi la specialan Esperanto-Tagon okazontan la 11-an de Junio 1910 kore invitas la helpon kaj ĉeeston de diverslandaj samideanoj.

La manifestacio okazos en la « White City », la sidejo de la *Japan-Brita Ekspozicio*. Oni certigas ke la Ekspozicio mem estas grava afero senegala, kaj ne ripetebla. Estos videblaj interesajoj nepermesitaj en Japanujo mem al la rigardo alilandula.

Lastan jaron partoprenis en simila manifestacio en la sama loko pli ol 1200 samideanoj, sed en la nuna jaro, ĉar la Ekspozicio mem allogos pli grandan popolamason estos dezirinde ke du ĝis tri mil samideanoj venu por konverti la ĝis nun ne-esperantistigitajn.

Ni donas ĉi sube, la provizoran Programon.

Vendredon, 10-an de Junio. Speciala Societa Kunveno ĉe St Bride's Institute Ludgate Circus (sidejo de la centra Londona Klubo).

Sabaton, la 11-an de Junio. Speciala festo ĉe la *White City*. Manifestacio en unu el la grandaj Ekspoziciaj ĉambroj. Kanto de l'*Espero*, ludota de unu el la plej famaj militistaj Muzikistaroj. Koncerto, kiam kantos speciale instruita kantistaro de 100 knaboj, kaj Specialaj Piroteknikoj.

Dimanĉon, 12-an de Junio. Diservo, en unu el la Preĝejoj. Ekskurso sur la rivero « Tamizo ».

London, 13-an de Junio. Oficiala Ĉiujara Kunveno de la Brita Esperantista Asocio, ĉe St Bride's Institute, Ludgate (sidejo de la Londona Klubo) sekvota de festo en la sama loko.

La kunhelpo de *Esperantianoj* estas urĝe petata.

La Komitato por *Esperanto-Tago*.

H. Bolingbroke Mudie Prez. U. E. A.

G. J. Cox.

Cedric F. White.

VARIETEA MONDO

La Ia Katolika Tutmonda Kongreso en Parizo

[...]

La rezulto estis sukcesega nia Kongreso elmontris al la tuta mondo ke vera internacia lingvo ekzistas, ke estonte ne plu estas necese dum iu ajn internacia Kongreso, uzadi 3 aŭ 5 diversajn lingvojn kiujn la plimulto de la ĉeestantoj eble ne komprenos. Ne, ĉar lingvo internacia ekzistos, tiel simpla, tiel facila ke ĉiu, je normala kapableco, povus ĝin lerni kaj paroli flue, post du monatoj da studado. Plie, nia Kongreso pruvis ke Esperanto taŭgas por iu ajn speco da diskutado. Efektive, jen kelkaj temoj pri kiuj oni pritraktis dum la katolika kongreso.

1e La unuiĝo de la diversaj ne katolikaj Eklezioj al la Petra Seĝo (Cathedra Petri). Pastro Anglikana kaj Ortodoksa Ruso longe pritraktis tiun temon kaj ni legis raportojn en Esperanto, el Ameriko, Rumanujo kaj Armenio, same celantajn.

2e Post longa kaj iome agita diskuto pri la elparolado de la latina lingvo, oni fine voĉdonis por la deziro elektigi la roman elparoladon almenaŭ inter katolikaj.

3e Oni legis multajn raportojn havigitajn dank'al Esperanto, el diversaj landoj pri la diversaj manieroj por kolekti la « Soldon por la Kulto » en landoj kie la Ŝtato ne plu monhelpas la Eklezion.

4e La mondkonata Frato Izidoro la Apostolo por la Blindulo, elmontris kaj klarigis la utilecon de Esperanto por helpi la blindulojn kaj esprimis la deziron ke baldaŭ, dank'al nia kara lingvo, tiuj malfeliĉaj gefratoj povus ĉiuj facile interrilati.

5e Oni pritraktis multajn aliajn demandojn, socialajn kaj filantropajn.

6e Oni definitive starigis la regularon de la Tutmonda Katolika Unuiĝo Esperantista (T. K. U. E.), kiu jam havas naciajn ligojn en Francujo, Anglujo, Belgujo, Hispanlando, Rusujo kaj Italujo. La T. K. U. E. estas entrepreno de la U. E. A.

[...]

Internacia Instituto de Esperanto

La Internacia Organizo kaj la Internacia Asocioj

de PAUL OTLET

[...]

promesas... »

(Daŭrigota). Trad. E. Ramo.

REKLAMO

TARIFO

Una paĝo	$ 240	*1/8 kolono*	$ 5
Una kolono	40	*1/16 —*	2.50
1/2 —	20	*1/24 —*	1.75
1/4 —	10		

Rabato da 10 % por 3 reklamoj, 25 o/o por 12 reklamoj; 50 o/o por 24 reklamoj. Nenia alia rabato aŭ prezo konsentata.

Sin turni al la *Administrejo*, 10, rue de la Bourse, *Genève* (Svisujo) aŭ al la *ĝeneralaj agentoj*: G. Warnier, 15, rue Montmartre, *Paris*; Presejo de Esperanto, 15, rue Amiral Roussin, *Dijon* (Francujo); C. kaj G. Browne, Wellington St., Strand, *London* (Anglujo); Germana Esperanto-Librejo, Rathausstr, *Leipzig* (Germanujo); Traduka Oficejo, 6 Schleinitzstr. *Bromberg* (Germanujo); Librejo Saharof, Tverskaja 29, *Moskvo* (Rusujo).

ESPERANTO *estas la plej bona internacia reklamilo por ĉiuj komercistoj, industriistoj financistoj, aferistoj,*

Ĉar ĝi estas la plej legata el ĉiuj Esperantaj gazetoj,

Ĉar ĝi havas legantojn en 44 landoj de l'terglobo,

Ĉar ĝi estas la oficiala organo de U. E. A.

[...]

ANONCETOJ

TARIFO